

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
januaro-marto 2010

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Kultura disvolviĝo—kial kaj kiel?

En la revuo *Americas* (junio 2009) aperis artikolo (“Banking on Culture”) kiu informis pri la donacioj kiujn faras la Interamerika Banko por Disvolviĝo al individuoj kaj malgrandaj grupoj. (Kutime, kiel legantoj de *La Kalumeto* certe scias, la Internacia Banko por Disvolviĝo pruntas monon por grandaj ekonomiaj kaj soci-disvolviĝaj programoj.)

La celo de la donaci-programo estas krei “socian kapitalon,” kiu ebligas pli plenan funkciadon de socioj. Inter la ricevintoj de donacioj estas ĥoro en Surinamo, kulturcentro en Haitio, kaj muzikprogramo en Paragvajo. Speciale interesaj por PIP-anoj estas programo por konservi kaj defendi antaŭ-kolomban kulturan patrimonion, kaj programo en Panamo por la protektado kaj konservado de rok-arto.

La projektojn elektis lokaj agantoj por la Interamerika Programo por Disvolviĝo. Ĉiu elektita grupo ricevas monon kaj konsultojn pri ĝia uzado por atingi siajn celojn. Komentis administranto de la donacia programo, “Speciale por la malriĉuloj, kulturo ne estas luksaĵo; ĝi estas necesaĵo. Trans tempo, ilia krea energio kaj ilia imagopovo sin montros kiel la plej valoraj valoraĵoj de la regiono”

(La revuon *Americas* eldonas Organizo de Amerikaj Ŝtatoj.)

“Pluropulo”—kia li au’ ŝi estas?

“Granda proporcio de afrikanoj scipovas pli ol unu afrika lingvo kaj, krom tiuj lingvoj, parolas eŭropean lingvon. Tio, kiu unue ŝajnas esti problemo, povas, malgrau’ ĉio, reprezenti konsiderindajn eblecojn por la estonteco. Povas okazi ke scipovi plurajn lingvojn ebligas al ni afrikanoj fari ion danĝere maloftan; vojaĝi inter diversaj identecoj kaj viziti la identecojn de aliuloj.

“Mi proponas ‘pluropulon,’ au’ plurlingvulon. Apud lingvo kiu mondanigas nin devus esti alia kiu ekstermondigas nin. Unuaflanke, lingvo estas vojaĝ-kapabliga flugilo. Aliflanke, lingvo kreas radikojn kaj lokecon.”

(El Gods and Soldiers (Dioj kaj Soldatoj): “Lingvoj Kiujn Ni Ne Sciis ke Ni Scipovis” de (s-ro) Mia COUTO (Mozambiko))

LEGANTOJ: Bonvole komparu la antaŭan kaj la sekvantan artikolojn.

Lingvo: inkludado kaj ekskludado

En la elekto-komentoj pri la nobela premio pri literaturo por 2009, ni povas legi: “Ŝi diskutas la gravecon de lingvo kiel identeco, kaj ekzemplas manierojn per kiuj plimulto uzas lingvon por identigi (laŭvorte: ‘brulstampi’) eksterulojn.”

Kvankam S-ino Herta Muller (Rumanio

/Germanio

) certe ne pritemis indiĝenajn kulturojn au’ lingvojn, oni povas vidi la demandon de ekstereco kaj interneco kiel fadenon kiu teksigas tra lingvo-elektado kaj lingva permesado au’ malpermesado. Ĉu temas pri enmigrintaj gepatroj kiuj ne parolis la denaskan lingvon antaŭ siaj infanoj por ke la infanoj lernu la “novan lingvon”? Ĉu temas pri la fifamaj “indianaj lernejoj” en Usono kaj aliaj landoj, en kiuj la infanoj ricevis punojn kiam ili parolis siajn denakajn lingvojn, eĉ kiam ili estis ekster la klasoĉambro? Ĉu temas pri kelkaj indiĝenaj lingvoj en kiuj ekzistas unu versio por viroj kaj alia versio por virinoj? Ĉiuj estas ekzemploj de la manieroj per kiuj homoj inkludas au malinkludas aliulojn per lingvaj decidoj kaj faroj.

“Lingvo estas socia praktikado”

“La plej bona maniero por konservi lingvon estas tio ke homoj parolu ĝin al homoj kiuj komprenas ĝin. Sekve, la plej bona maniero por konservi lingvon estas tio, ke homoj premiu kaj instigu la homojn kiuj volonte au’skultas, kiuj kapablas au’skulti kaj “au’di”. “Au’dado” ne temas pri orela kapablo, sed pri komprenado. Sen ĉirkau’aĵo en kiu lingvoj “au’diĝas,” tio estas, kompreniĝas, lingvoj ne povas konserviĝi. Ili konserviĝas nur kiam ili vivas.

Se oni konservas ilin kiel aj’ojn, ili estas mortintaj. Lingvo ne estas aĵo; ĝi estas sociala praktikado.”

(s-ro John VON STURMER, Voice of the Land (Voĉo de la Tero), januaro 2009, FATSIL / Federacio por la Lingvoj de Aborigenoj kaj Insulanoj de la Markolo de Torres)

El “Registro de Bonaj Praktikoj pri Lingvo-Konservado” (Unesko):

Baza Normigo de Ĉiuj Neskribitaj Afrikaj Lingvoj en Kameruno

Pluraj lingvoj en Kameruno jam akiris alfabetojn, lernolibrojn, kaj legolibrojn per la laboro de la Landa Asocio por Kamerunaj Lingvo-Komitatoj, kiu troviĝas en Jaunde, la ĉefurbo de tiu lando.

Esence, la programo funkcias per la interagado de la paŝoj de la normig-programo kun la energio, volo, kaj trejnado de junaj studentoj de lingvistiko en Jaunde. Pro la normig-programo, ekzistas koncepto de bazaj ingrediencoj kaj paŝoj por ebligi la legadon kaj skribadon de la cel-lingvo: alfabeto, ortografad-gvidilo, vortolistoj,

instru-gvidiloj, kaj tiel plu. Volontuloj vojaĝas al vilaĝoj en la diversaj lingvo-teritorioj, prezentas tie la koncepton de legipovecon, prezentas kaj instrue funkciigas la lernigilojn, evaluas la fortecon de la lingvo kaj lingvo-komunumo, kaj kapabligas lokajn volontulojn pri la daŭrigado de la lingvo-laboro. (Ofte, tiuj personoj jam scias legi la francan, la pli ĝenerale uzita el la du oficialaj lingvoj en Kamernio.) Se ĉio bone funkcias, la partoprenantoj mem kune verkas rakontolibron, la unuan libron verkitan en tiu lingvo.

Kompreneble, abundas problemoj. Ekzemple:

---Multaj lingvoj havas dialektojn; kiu dialekto estu la elektita (instruita, skrib-kapabligita, ktp.)?

--- Student -volontuloj devas alfronti la viv-kondiĉojn de la kamparanoj de sia lando, atingi ne ebla por ĉiuj kiuj deziras partopreni la programon.

---Lingvo-komunumanoj ofte ne komprenas la koncepton de voluntula laborado, kaj malfacile povas partopreni trejnadon pro ekonomiaj kialoj.

Tamen...se aferoj iras normale, inter 24 kaj 30 monatoj de forta laboro kaj kunlaboro povas krei skribsistemon por lingvo kaj kapabligi la parolantaron iĝi ankau' legantaron kaj skribantaron. Ĉu "bona praktiko"? Jes ja!

Informokanto / Informobendo

Mallarĝe konata ero de usona historio estas la "salokantoj". Tiuj kantoj de la indiana gento nuvubi-a (anglalingva nomo: Nŭuvi) pritemas montojn, plaĝojn, dezertojn, kaj riverojn. Ankau' la 142 kantoj priskribas lokojn por trovi

salon, plantojn, historiajn lokojn kaj eventojn, kaj var-interŝanĝeojn.

Oni kantas la kantojn individue kaj are, ne nur por informi la vojaĝantojn pri la tereno, kiel en antaŭaj tempoj, sed ankau' por lerni kaj kompreni/rememori la valoron de perdita kulturo.

Estas interese rimarki ke la kantociklo saviĝis kiam la lasta kantinto mortis pro maljuneco. Samtempe estiĝis informbendo kaj mapo pri la kantoj mem kaj la laborado kiu okazis por ke la kantoj kaj sia lokoj en usona kaj monda historio ne perdiĝu.

Feliĉe, maljunaj anoj de la nuvubi-gento kunlaboris kun pli junaj gentanoj kiuj pretis lerni la 142 kantojn. Nun ekzistas registroj de la kanto-ciklo. Ankau' ekzistas prezentadoj al aŭdantoj; tiuj ofte okazas dum funebraj ceremonioj, por ke la mortintoj bone faru siajn lastajn vojaĝojn. (Dum tiuj eventoj, la kantado okazas inter sunsubiro kaj sunleviĝo.)

Alia grava aspekto de la kantoj estas tio, ke ili registras kontakton inter la indianoj kaj la diversaj terenoj. Tiu punkto povas gravi rilate decidojn pri la uzado de terenoj.

(Informofonto: Neŭs from Native California (Novaĵoj el Indiĝena Kalifornio), Usono, vintra numero 2009/2010.)

Kunvivi en komunumo

En Kigalo, Ruando, ekstariĝis artocentro kie pentristoj, dancistoj, kaj skulptistoj povas studi kaj povas realigi—kreadocele kaj vivtenocele—siajn viziojn. La nomo de la artocentro, tau'ga nomo en ŝirita lando, estas "Ivuka," au' "renaskiĝo".

Bela historieto, sendube, sed kial ĝi aperas en La Kalumeto? Ĝi aperas pro tio ke la centrestro, s-ro Collin Sekajugo (elp. sekaĝugo) starigis, en la kadro de Ivuka, la dancotrupon "Rwamakondera". Per tiu trupo, Sekajugo kaj la malriĉaj infanoj kiuj studas kun li dancas la malnovajn rakontojn de sia lando, kaj faras tion per dancostiloj bazitaj je landaj tradicioj. Eĉ pli grave por la estonteco de Ruando kiel moderna lando, Sekajugo instruas ke dum la dancado, anoj de malsamaj gentoj devas kundance kaj artatinge unuiĝi, estu kiu estu la etna inspiro de specifa danco.

(Fonto: Utne Reader, Usono, januaro-februaro 2010)

Historio ĉe la manĝotablo

Inter la anoj de la gento Tohono O'odam (Usono), diabeto estas ege ofta sanproblemo.

Responde al tiu grava situacio, nun ekzistas programo por resanigi la genton per kunposeditaj sanoscioj kaj unuopaj decidoj. La grupo Tohono O'odam Community Action (Komunuma Agado) starigis la programon, celinte sanan kaj sanigan nutradon per tradiciaj manĝaĵoj.

Ĉefrolas specifa fabo-speco, specifa maizo-speco, melonoj, kaj la frukto de la "saguaro"-kakto. Tiuj manĝaĵoj helpa plinormaligi la sukeron en la homa korpo kaj pensigi la manĝantojn pri la rilato inter la naturo, gentaj tradicioj, kaj homa sano.

Tohoma O'odam Community Action ankau' inkludas korboteksan kooperativon, programojn por junuloj kaj por kultura esprimado, kaj kafejon "Desert Rain" (Dezerta Pluvo).

(Fonto: Utne Reader, Usono, januaro/februaro 2010.)

Tri kantoj de amo kaj malamo

Ĉu Vi Diras ke Mi Maljunas?

Ĉu vi diras ke mi maljunas, maljunas?

Ĉu vi diras ke mi maljunas, maljunas?

Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?

Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?

Ĉu vi diras ke mi maljunas?

Se jes, kiel mi laboras en via domo?

Se jes, kiel mi naskas infanojn por vi?

Se jes, kiel mi faras agrikulturan laboron por vi?

Ĉu tiuj laboroj ne fontas el la sama korpo?
Do, ĉu vi diras ke mi maljunas, mi maljunas?
Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?
Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?
Ĉu vi diras ke mi maljunas?
Vi diras ke mi maljunas, ĉu ne?

Do, kial vi hierau'nokte serĉis min?
Do, kion vi hierau'-nokte faris kun mi?
Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?
Ĉu mi maljunas nur de la talio ĝis la kapo?

(Talaĝ-gento, Niĝerio. Ĉi tiu kanto esprimas la ĉagrenon de virinoj kiuj estas aŭ iĝos kun-edzinoj. Fonto: Women Writing Africa (Virinoj Verkas Afrikon), volumo 2.)

Kanto de la Edzinoj

(Kantas la subtenantinoj de la unua kun-edzino:)

La dua edzino estas senvalora.
Dio malbenu la virinon kiu estas senvalora.

La dua edzino estas cikonio de malbona ŝanco
kiu heraldas vintron, sed ne povas resti.

(Kantas la subtenantinoj de la dua kun-edzino:)

Ĉu ili frenezigaŝ,
tiuj unuaj edzinoj kun malplenaj kapoj?
Oni portis vin ĉi tien.
Oni portis nin ĉi tien.
Haltigu la atakon.

(Zerme-popolo el Niĝero. Ĉi tiu kanto esprimas la emocian streĉitecon inter unuaj kaj duaj edzinoj. Fonto: Women Writing Africa (Virinoj Verkas Afrikon), volumo 2.)

Virina Amkanto

Ho Tara, patro de mia filo ankoraŭ ne naskita,
jen via kanto,
ni subakven lanĉis ĝin.

Vi eniris min,

vi per doloro konstruis en mi.

Kaj nun la subvoĉo en mia orelo
estos malkaŝigita plenvoĉo.

(Fonto: Maori, de Ans Westra kaj James Ritchie)

Pistado-roko

de s-ro Don JACK, Usono (indiano el la mono-gento)

Mi ekvidas pistado-rokon dum mi fiŝkaptas. Mi ĉirkau'rigardas kaj rimarkas malnovan kampadejon. Mi trovas ombran lokon sub kverko, sidiĝas, apogas mian dorson kontraŭ la arbon, kaj enfokusigas la pistado-rokon. Malrapide la sonoj ĉirkau' mi neau'debliĝas, dum aliaj sonoj pli forte au'debliĝas. La sonoj kiujn mi au'das, venas al mi de la pistado-roko dum kvazau'formiĝas la virinoj kiuj pistas la kverko-glanojn. Mi au'das iliajn voĉojn, la obtuzan bruon de la pistado-ŝtonon dum ĝi premrompas la glanojn en la pisteja ŝtono. Ĉirkau' la virinoj estas la korboj, kun glanoj je diversaj prepar-stadioj. Unu entenas la nerompitajn glanojn, alia pistitajn glanojn kribrotajn,* Alia entenas la glanokernajn buletojn, pretajn por la dua pistado. Au'debliĝas aliaj sonoj: la voĉoj de infanoj kiuj kunludas apud la rivereto; falkokrio dum alta flugado; la klaketvoĉoj de eu'tamioj kiuj ĉien kuras. La garoloj ŝajne riproĉas ilin pro ilia klaketado.

Pro la ridado de la virinoj kaj geknaboj, mi pensas ke ili finis la glano-pistadon. Baldau' la fajroj rostos la viandon kaj la fiŝaĵon. Mi preskau' povas flari la kuiritan viandon kaj la glanopladojn. Tio lasas sopiron en mia brusto. Ho, kien ĉi ĉio foriris?

Post kiam oni senŝeligas glanojn kaj pistas la kernojn, oni devas meti la pistaĵon en kribrilo kaj traverŝi akvon ĝis kiam la pistaĵo ne plu entenas tanan acidon. Tiam la glanpistaĵo estas manĝebla.

(Fonto: Neŭs from Native California (Novaĵoj el Indiĝena Kalifornio), Usono, vintra numero 2009/2010)

Suno kaj Luno

La Luno koitis kun multaj virinoj, sed li atingis plezuron kun neniuj el ili. Tiam li decidis koiti kun sia fratinetoj, la Suno. Li tegis sian vizaĝon per cindroj, kaj kaŝeme kuŝis kun ŝi inter ŝiaj dormopeltoj. Poste, ŝi diris, "Nekonatulo, denove faru tion."

Kaj tion ili tutnokte faris.

La Suno matene eksciis kiu estis sia kunaminto. Ŝi tre ĉagreniĝis. "Vi neniam plu faros al mi tiun aĉaĵon, Frato," ŝi diris.

"Ho, ĉu mi ne faros? Mi estas la pli forta."

La Suno prenis "ulu"-on (tranĉilo uzita nur de virinoj) kaj fortranĉis siajn mamojn. Tiam ŝi miksis sian urinon kaj sangon kun la mamoj, kvazau' ŝi preparus "aktuk" (inuitan deserton el balenograso kaj beroj). La fipladon ŝi prezentis al sia frato, kaj

diris al li ,”Jen, manĝu ĉi tion se vi deziras ekscii mian korpoguston”. Tiam ŝi forkuris la domon. La Luno pau'zis por manĝi la mamojn, kaj poste sekvis ŝin.

Ankorau' li sekvas sian fratineton, eĉ hodiau', por kapti ŝin kiel kun-koitulinon. Sed ŝi pli rapidas, kaj ĉiam konservas longan distancon inter ili. Do, pro la volupto de la Luno, la nokto sekvas la tagon.

(Fonto: A Kayak Full of Ghosts: Eskimo Tales (Kajako Plena je Fantomoj: Eskimaj Rakontoj), Laurence MILLMAN, 1987.)

Ĉiujn tradukojn al Esperanto faris la redaktoro.

PIP sendas nacilingvajn rezumojn de La Kalumeto al diversaj universitatoj, UNO-fakoj, ne-registaraj organizoj, kaj aliaj organizoj kiuj interesiĝas pri indiĝenaj popoloj au' celas apogi ilin. Estas necese trovi volontulojn por fari la nacilingvajn tradukojn de la resumoj. Se vi povos helpi pri tio, bonvole anoncu vin!

Se vi havas artikolon, recenzon, tradukon, au' similaĵon por aperigo en la bulteno, bonvole kontaktu min:

(s-ro) Erik FELKER / 414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank , CA 91501 / U.S.A.

[ejfelker@dslextreme .com](mailto:ejfelker@dslextreme.com)